

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ĝikago

№8, Aŭgusto, 2008

Niaj karaj legantoj! Antaŭ unu monato mi informis vin, ke ĉi numero estos dediĉita al la plej grava jara E-evento, al la UK en Roterdamo. Nia speciala raportisto, Harry Paul Barron (Kimrujo), unu el kunaŭtoroj de la kimra E-lernolibro, malnova membro de EAB, mia persona fidela amiko dum pli ol 10 jaroj, kontribuis por la aŭgusta eldono kaj pri la rezultoj vi juĝu mem. Por epigrafo estis elektita poemo (fragmento) de d-ino Marjorie Boulton (Oksfordo, Anglio) "Rotterdam' renaskita":

Ho, urbo de mil mastoj
kaj grizaj gruoj,
ŝipoj de ĉiuj rasoj, ĉiuj kasto

havenas en vi pace,
en viaj gastamaj vastoj...
Ho brava urbo de kuraĝaj homoj,
printempa urbo de kreskantaj domoj,
saluton!

La 93a UK de Esperanto en Roterdamo, 2008

Harry Barron



Ĉi-jare, la 93-a kongreso de Esperanto okazis en Roterdam, Nederlando de la 19a de julio ĝis la 26a. Oni elektis ĉi tiun urbon, pro la fakto, ke ĉi-jare, ni festas la centjariĝon de Universala Esperanto Asocio, kiu havas sian centran oficejon en Roterdamo. Al la kongreso aliĝis pli ol 1840 partoprenintoj, el almenaŭ 73 landoj, kiuj donis al la kongreso veran internacian etoson. La loko de la kongreso estis la Beurs (aŭ Borso), kiu lokiĝis ĝuste en la centro de la urbo, flanke de la komercejo kaj bone servita de bus-, tram- kaj metrotransportoj, kiu estis tre konvena. Tamen, kelkaj homoj eble dirus, ke la loko mem ne tre taŭgis por tiom da partoprenantoj, ĉar la ĉefa kongresa halo ne povis enteni ĉiujn ĉeestantojn, tiuj, kiuj ne povis eniri, estis devigataj sidi en aneksa salono kaj devis spekti la okazaĵojn pere de grandaj televidaj ekranoj dise en tiu salono, kiu ne plaĉis la multaj homoj, ĉar oni ne sentis sin tute inkluzivitaj. Tamen, la Borso estis la plej granda kongresejo en Roterdamo, kaj ni ne rajtas plendi tro, ĉar estis evidente, ke la LKK faris multajn penojn por certigi, ke la ĉi-jara kongreso estu granda sukceso. Kaj malgraŭ tiuj plendetoj, ĝi ja estis granda sukceso! La temo de la kongreso por ĉi tiu jaro estis "Lingvoj: Trezoro de la Homaro", kiu koincidas kun la Internacia

Jaro de Lingvoj de UNESKO en 2008 kaj la ĝenerala direktoro de UNESKO sendis sian personan mesaĝon al la kongresanoj, konfirmante, ke li agnoskas la gravan rolon, kiun Esperanto kaj Esperantistoj havas en la mondo. Do, sufiĉas pri la kongreso kaj la kongresa temo; kion pri la kongresaj okazaĵoj kaj la partoprenantoj? Por multaj novaj esperantistoj, UKoj povas esti timigaj eventoj, tamen, ĉi-jare, la organizaĵo "edukado.net" lanĉis novan sistemon por kuraĝigi konencantojn paroli kun pli spertaj esperantistoj. Ĉe ilia budo dum la interkona vespero, la deĵorantoj demandis al la vizitantoj, ĉu ili estas spertuloj aŭ komencantoj, kaj ĉu la spertuloj pretas paroli kun komencantoj. Se jes ili forprenis kaj portis sur sia ekstera vestaĵo ruĝan pinĉilo por indiki sian pretecon helpi komencantojn. Kaj se komencanto deziris praktiki sian parolkabablecon kun iu ruĝpinĉilportanta spertulo, do tiu kunprenis



kaj portis sur ties vestaĵo verdan pinĉilon. Nobla ideo, laŭ mi. Kiel atendite, dum UK-oj estas ekskursoj, kaj unu el la ekskursoj estis vizito al la Centra Oficejo. Aldone, proksimume 200 homoj estis invititaj al akcepto ĉe la urbodomo de Roterdamo, kaj tie atendis la ĉeestintojn bela surprizo. La vicurbestrino de Roterdamo, s-ino Jantine Kriens, donis prelegon pri Roterdamo kaj pri ties intersaj aspektoj tute en preskaŭ perfekta Esperanto! Kompreneble, inter ĉio ĉi estis la kutimaj prelegoj, kursoj, ekzamenoj, kunvenoj, renkontiĝoj, komunaj manĝoj, koncertoj, libroservo (kie mi elspezas ĉiam tro da mono ĉiu jaro!) kaj ĉio, kio garantias plenan sukceson de iu ajn kongreso. Kaj, kiel kutime, kanti la Himnon je la fino de la kongreso ĉiam larmigas homojn, antaŭ siaj adiaŭoj, kaj espero revidi unu la aliajn en la venonta jaro. [La Universala Kongreso pravas, ke ni, homoj, povas vivi unu kun la alia, spite de nia lingva, kultura aŭ religia fonoj. Kaj se vi neniam ĉeestis tian grandan eventon, nu, mia sugesto estas, ke vi serioze konsideru ĝin, ŝparu iom da mono kaj, kiu scias, eble vin mi kenkontos venontjare en la naskiĝurbo de nia Majstro, Ludoviko, en Bjalistoko, Pollando. Fine, mi ne povas raporti pri ĉio en la kongreso, do mi instigas vin kontroli rete la Jubileanton pere de <http://uk08.lafontano.net/informilo.php>

UK'2010

La universala kongreso de Esperanto en 2010 okazos en Havano en Kubo. Tion anoncis la ĝenerala sekretario de UEA Barbara Pietrzak en la solena fermo de la Roterdama UK sabate matene. La decido pri la kongresurbo faris la estraro de UEA fine de la kongresa semajno. Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, jam en februaro vizitis Havanon laŭ invito de Kuba Esperanto-Asocio. La celo de lia vizito estis esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA nun venigas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo. Unuafoje la UK okazis en la kuba ĉefurbo en julio 1990. En majo la ĝenerala direktoro vizitis Moskvon, kiu same invitis la Universalan Kongreson por la jaro 2010, ĉar la pli frua invito por la jaro 2009 ne estis sukcesa. Ankaŭ en Moskvo la lokaj aŭtoritatoj promesis subtenon por la kongreso, sed la estraro de UEA fine preferis la proponon de la kubaj esperantistoj. La elekto de Kubo jam de kelka tempo aspektis klare pli verŝajna ol ke Moskvo ricevu la kongreson en 2010. Eble iom influis favore al la elekto de Kubo ankaŭ la leteroj de du elstaraj rusiaj esperantistoj, kiuj turnis sin al la estraro de UEA kaj malrekomendis kongresi en Moskvo en la nunaj cirkonstancoj. Kiel argumentoj malfavoraj al Moskvo oni ofte menciis la altajn prezojn en la hoteloj de Moskvo kaj la komplikecon de la vizaj proceduroj. La subtenantoj de Moskva UK atentigis, ke dum la pli ol 120-jara historio de Esperanto ĝis nun neniam okazis Universala Kongreso en Rusio, dum multaj jaroj unu el la plej gravaj landoj de la movado.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

26an de Aŭgusto – ĉiuj raportos pri siaj someraj spertoj kaj aventuroj

23an de Septembro – temo estos anoncata

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

